
# *Almena? 10 mortintoj kaj pli ol 400 vunditoj dum protestoj en Kolombio*




**Luisa Gonzalez / Reuters**

Bogoto, sep 11 (RHK) Almena? 10 personoj forpasis kaj pli ol 403 estis vunditaj dum la protestoj okazintaj en kelkaj urboj kolombiaj pro la morto de la  advokato Javier Ordóñez mane de policistoj, kiuj uzis elektran armilon kontra? li.

La? la raportoj de la gazeto El Tiempo, 7 personoj mortis en Bogoto kaj tri en Soacha, distrikto de Cundinamarca. Aliflanke, inter la vunditoj estis 194 policistoj kaj 209 civiluloj.

La manifestaciantoj kontra? la polica perforto ?efe okazis en Bogoto, Medellín kaj Barranquilla. En kelkaj areoj okazis tumultoj kaj konfronti?oj inter la polico kaj la manifestaciantoj. La tago estis markita de kelkaj agoj vandalaj kaj ?oseoj estis blokitaj. La publika transporto en la ?efurbo estis haltigita je la oka horo vespere.

Dume la prezidento Iván Duque "alvokis al kalmo, sereneco kaj fido je la institucioj, por ke rapide la a?toritatuloj klarigu la okaza?ojn".

Pasintmarde, la advokato estis arestita de la polico pro malplenumo de la kvarenteno. Per video diskonigita de atestintoj, du policistoj senmovigis lin surplanke kaj pafis la elektran tu?ilon, spite al liaj petoj haltigi tiun agon.
Ordoñez kaj alia amiko estis arestitaj kaj translokitaj al la Stabo de Tuja Reago (CAI). La? rakontis la amiko, en la policejo la oficiroj "batadis lin forte".

Post la perforta aresto, Ordóñez estis enhospitaligita, kie poste forpasis, la? oni informis al la familio.

Fonto:RT

---

https://www.radiohc.cu/eo/noticias/internacionales/233847-almenau-10-mortintoj-kaj-pli-ol-400-vunditoj-dum-protestoj-en-kolombio

**Radio Habana Cuba**